**Por ĉiutagaj informoj, eventoj kaj interesaj enhavoj, sekvu ankaŭ nian paĝon ĉe** Facebook **kaj** Twitter**.**

**447 | Majo 2018**

Ĉu vi ne vidas ĝuste la mesaĝon? Rigardu ĝin en via retumilo.

## Voĉdono por Komitatanoj B

Komenciĝis la **voĉdono por Komitatanoj B**, kiuj reprezentas la individuajn membrojn! La kandidatoj estas **Michael Boris Mandirola** kaj **Robert Nielsen**.

Kontrolu vian retpoŝtkeston kaj uzu vian influpovon en la funkciigado de TEJO!
La voĉdono daŭras **ĝis la 11-a de junio**, sed ne prokrastu, voĉdonu tuj!

Se vi ne ricevis retpoŝton, sendu pruvilon de via membreco al **info@tejo.org** kaj **gxen-sek@tejo.org**.

---

## TEJO ĉe la European Youth Event!

TEJO partoprenis **European Youth Event** en **Strasburgo** kun granda delegacio de junaj Esperantistoj!
En la venonta elsendo de TEJO Aktuale vi trovos detalan rakonton pri kio okazis!

---

## IJK2018 en Badajoz – La plej mojosa evento de la jaro!

Ĉu vi pretas por la plej mojosa evento de la jaro?
La **#IJK2018** – Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto en Badajoz, Hispanio.

Vidi la videon ĉe nia retejo.

---

## Kunlaboru en esploro pri Esperanto

## en universitatoj

Ni invitas vin kunlabori en internacia kvalita esploro por verki raporton pri la situacio de **Interlingvistiko kaj Esperanto en universitatoj**, baza deirpunkta dokumento por la Nitobe-Simpozio kiu okazos tuj post **UK 2018** en Lisbono.

Pliajn ligilojn ĉe nia retpaĝaro**.**

---

## Komitatanoj A de TEJO 2018-2020

Venis la tempo por nomumi **Komitatanon A de TEJO** por la oficperiodo **de la 1-a de junio 2018 ĝis la 31-a de majo 2020**. La komitatanoj A estas reprezentantoj de la landaj kaj fakaj sekcioj de TEJO.

Legi la detalojn ĉe nia retpaĝaro.

---

## Nova numero de Revuo Kontakto: Homeopatio kaj la debato pri la scienca scio

La nova numero de **Revuo Kontakto** aperis en la reto! La ĉeftemo de la numero estas **Homeopatio kaj la debato pri la scienca scio**.

Legi pli.

---

### Venontaj Eventoj

- 14 - 22-an de Julio 2018 - Somera Esperanta Studado en Liptovský Mikuláš, **Slovakio**
- 4 - 11-an de Aŭgusto 2018 - IJK 2018 en Badajoz, **Hispanio**

---

## Ideo: La internacia vojo ESPERANTO

Naciaj aŭ internaciaj vojoj, tra la mondo, **ekzistas multaj famaj vojoj** : la Vojo Sankta Jakobo de Kompostelo, la Vojo 66 en Usono, la Vojo Via Domitia ligante la Alpojn kun la Pireneoj.
Mia ideo estas **krei la internacian vojon ; ESPERANTO** danke al **Zamenhof/Esperanto objektoj** (ZEOj).

Do, mi deziras inviti vin pripensi tion kune : *kiel valorigi « ZEOjn » por krei la internacian vojon ESPERANTO* ? Eble ni povus publikigi libretojn kun ĉiuj « ZEOj » de la Mondo kaj fari pasporton, kiu estus subskribita de la turismaj oficejoj aŭ la urbodomoj ?
Tiel la vojaĝantoj havus belegajn memoraĵojn de siaj vojaĝoj kaj Esperanto estu pli konata en la institucioj.

Ĉu vi havas aliajn ideojn?
Bonvolu skribi al **info@tejo.org** aŭ al: Isabelle.Nicolas2@gmail.com

## Kolofono

***TEJO Aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas 1 foje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** Gilbert Niyukuri
**Kontribuanto de ĉi tiu numero:** Paul Helly, Ariel Palmer

**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), tejo.org

*Kopirajto © 2018 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn?
Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni vin de ĉi retpoŝta bulteno